

# Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika  
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

## ŜOHĤIK KAJ PECĤIK

De D. DEMIRĤJAN.

Estis vintra malvarma vespero.

Neĝis ; la blankaj neĝeroj falis sur la malluman teron kaj dormis.

Ĉiuj neĝeroj malsupreniĝis de la nuboj kaj dormis dolĉe sur la varma tero ; nur du neĝfloketoj estis malfruiĝintaj. Ili ankaŭ, ludante en la aero, malleviĝis malrapide. Ili estis gefratoj ; la fratino estis nomata Ŝohik, kaj la frato Peĉik.

Ruliĝante en la aero ili ekvidis fenestron, tra kiu estis vidata hela lumo.

— Ha ! kia bona lumo estas ! — diris Ŝohik kaj ekflugis al la lumo, sursidiĝis sur la feraĵo de la fenestro.

— Ha ! kia bona lumo estas, — diris Pecik, kaj li ankaŭ proksimiĝis por sidiĝi sur la feraĵo, sed lia piedo ekglitis, li falis malsupren sur unu malsekan ŝtonon.

— Ŝohik, mi falis malsupren, — plendis Pecik.

— Nu, leviĝu alten, — diris Ŝohik de supre.

Pecik provis suprenflugi, sed ne povis.

— Mi ne povas, — li diris ; — venu al mi, Ŝohik.

— Tuj mi venos, tuj ; atendu, mi volas rigardi, kion ili faras, — respondis Ŝohik kaj enrigardis tra la fenestro.

Interne staris belega kristnaska arbo, kies verdaj branĉoj estis ornamitaj per brulantaj kandletoj kaj ludiloj. La kandletoj brulis, briletis kaj la brilantajn flamojn balancis gaje diversflanken. La ĉambro estis plena je infanoj. Ĉiuj gaje dancante ĉirkaŭ la arbo, turniĝis kaj kantis ; dum la kantado, kiam ili ĵetis siajn viglajn rigardojn sur la ĉevaletojn, bombonojn, ursetojn kaj la orumitajn nuksojn pendantajn sur la arbo, ili multe aplaudis kaj saltadis.

La okuloj de Ŝohik preskaŭ blindiĝis, kiam li ekvidis la kristnaskan arbon.

— Kiel bela estas la kristnaska arbo! — murmuris ŝi.

— Mi ankaŭ deziras ĝin vidi, — diris Pecik, kaj li denove provis leviĝi, sed ne povis.

— Ŝohik! venu!

— Tuj mi venos, kara Pecik, tuj.

— Nu, rapide, venu!

— Jen tuj, tuj, — diris Ŝohik, kaj daŭrigis enrigardi.

Pecik tremis sur la malseka, malhela ŝtono kaj atendis sian fratinton.

Sed Ŝohik estis tiel forlogiĝinta de la kristnaska arbo, ke ŝi jam estis forgesinta Pecik'on. «Kiel bela estas la kristnaska arbo!» pensis ŝi.

En tiu momento la infanoj ekkantis la novjaran kanton. Ŝohik ankaŭ deziris kunkanti, sed ŝi ne povis; ŝi nur briletis hele kaj ekridetis.

— Ŝohik! venu do! — vokis Pecik ploretante.

Sed Ŝohik ne aŭdis plu.

Baldaŭ oni disdonis al la infanoj fruktojn, kaj poste oni lotludis; la ĉevaletojn, ursetojn, leporetojn, bombonojn kaj la orumitajn nuksojn de la arbo oni disdonis al la infanoj.

— Hura! hura! — kriis la infanoj kaj aplaŭdis gaje.

Ŝohik ankaŭ volis krei «hura», sed ne povis; ŝi nur ridetis ĝoje.

Post kelka tempo la kristnaska festo finiĝis, kaj la infanoj, kun siaj ludiloj, disiris hejmen. Subite Ŝohik rememoris Pecik'on.

— Pecik! — vokis ŝi maltrankvile.

Sed Pecik ne ekzistis plu.

Ŝohik rigardis malsupren; li vidis, ke Pecik sur la malseka ŝtono tiel longe estis ploranta, ke li jam degelis kaj pereis.

— Ha, — ekkriis Ŝohik, domaĝis kaj malĝojis, restis sola sur la feraĵo de la fenestro. Malĝojis, malĝojis, fine el siaj okuloj elfluis larmoj, kaj ŝi ankaŭ degelis, falis sur la malsekan ŝtonon kaj malaperis. . . .

## MIA « EKJARO »

La unua afero, kiu surprizige haltigas la okulon de la leganto de tiu ĉi rakonteto, estas la vorto « *ekjaro* ».

Kion signifas tiu ĉi stranga vorto?

Nu, ĉu ĝi ne estas fabrikita laŭ la reguloj de Esperanto? « *Jaro* » signifas . . . jaro; « *ek* » estas prefikso esprimanta la komencon de l'ago. « Jes, — vi eble protestas, kara leganto, — sed « *jaro* » ne estas ago ». — Kial ne? kial « *jaro* » ne povus esti konsiderata kiel ago? Ĉu la jaro ne daŭras, pasas? ĉu ĝi ne *agas* konstante? Certe jes. Do, la jaro estas ago. — Estas vere, ke pro tiu ĉi meditaĉo la Geniino de la Logiko faligus maldolĉajn larmojn, se Ŝi havis en si ankoraŭ provizaĵon da larmoj, — se Ŝi ne estus jam antaŭ longe forplorinta ĉiujn siajn larmojn, pro la ĝadoj de la esperantistaj sin-apostoligemaj « *plibonigistoj* »; sed al mi estas egale! mi sukcesis pruvi, ke « *ekjaro* » estas perfekte farita, ĝusta vorto. (Ĉetere, nuntempe la esperanta vortfabrikado estas epidemio; ne estas do mirinde, ke ankaŭ mi, vivanta en la atmosfero de Esperanto, fariĝis *ekviktimo* de tiu ĉi infekta malsano.)

Kiel vi vidas, kara leganto, mi intencas rakonti al vi mian historion je la tago de l'novjaro . . . . .

Mia kutimo estas, ke ĉiuvespere, antaŭ la noktomezo, mi enlitigas por dormi. Facile estas do diveni, ke ankaŭ la 31-an de Decembro 1910, antaŭ la noktomezo, mi enlitigis por dormi. — Kuŝante en la lito, kutime mi meditas pri la okazintaĵoj de la lastepasinta tempo: simplajn tagojn, pri la okazintaĵoj de la ĵus pasinta tago; sabatojn, pri tiuj de la semajno; la lastajn tagojn de la monatoj, pri tiuj de la finiĝanta monato. Se vi, kara leganto, konkludas, ke la 31-an de Decembro mi meditas pri la okazintaĵoj de la agonianta jaro: mi kore gratulas vin pro via sagaceco.

— — — — — La homaro ne estas ĝuste organizita; nek el materiala, nek el morala vidpunkto. (Jena vea memplendo estas eltiraĵo el miaj meditoj je la 31-a de Decembro 1910.) El materiala vidpunkto: senproportia riĉegeco alternas kun malriĉegeco; el morala vidpunkto: malsincera flato, hipokrito, mensogo regas la mondon. Senĉesa batalado por la *mono*, per *trompo*: tio estas la vivoceco de la nunepoka senama homaro.

Mizero kaj krimo estas fratoj. . . .

Kuŝante en la lito, malespere mi levis ĉielen miajn manojn kunkroĉitajn kaj mallaŭte ekĝemis. Mi pensis pri mia malriĉeco; poste pri la riĉeco de mia onklo, la avara, malsana, kripla maljunulo, kiu ĉiam malavare donacadas al mi siajn konsilojn kaj konsolojn, — sed neniam, eĉ per unu spesa monhelpo li plifaciligis mian situacion. « Akiru monon ankaŭ vi, kiel mi faris »,

li kutime diras, kiam mi aludas pri mia malriĉeco, bezonoj, miaj infanoj, — paralele kun lia riĉeco, oportuna financa situacio, fraŭla soleco... Jes, « akiru monon, kiel mi ». Ankaŭ mi gajnu cent mil spemilojn per donacricevita lotbileto de mia patro !

Kaj mi, veramanto, estas devigata lin ĉirkaŭflati, ŝajnigi entuziasman amon al li, kore danki lin pro liaj konsiloj kaj konsoloj, pravigi liajn agojn... , nur tial, ke mi povu esperi fariĝi lia heredonto... Mensogo estas ĉie, la malvero triumfas.

— Ho, Vero ! kie vi estas ? — mi ekkriis maldolĉe, kaj miaj kunkroĉitaj manoj falis sur mian bruston.

— Hahaha ! — mi aŭdis raŭkan ridon apud mi. — Hahaha !

Surprizite mi rigardis flanken. En la kontraŭa angulo de la ĉambro staris belega, ĉarma, laŭmode vestita junulino.

— Kiu vi estas, fraŭlino ? — mi demandis, — kaj kiamaniere vi venis tien ĉi ?

— Sur mia vojo, tra la ŝlosiltruo, — ŝi respondis ridante. — Ĉu vi ne estas kontenta pri mia vizito ?

— Jes, sed... mi ne komprenas... Kion vi volas ? kiu vi estas ?

— Mi estas la diino de l'Mensogo, la plej fidela kaj plej konstanta amikino de la homoj. Mi venis ĉe vin, ĉar vi ĵus akre plendis kontraŭ mia funkciado en la mondo ; kaj mi volas vin averti, ke sen miaj helpoj vi ne povus vivi.

— For ! for de mi, fiulino !... aŭ alvenu tien ĉi, por ke mi povu vin sufoki.

— Neeble, — ŝi ekridis. — Senpripensa homa estajo, vi ! Vi volas min disigi de vi ? Estu do. Mi punos vin, sed ne tro severe. Aŭdu : *mi rifuzos al vi miajn servojn dum unu tago ; morgaŭ mi ne helpos al vi.*

Tion dirinte la bela junulino demetis ĉiujn siajn ĉarmojn : perukon, dentaron, robon, ŝi forlavis la pentrokoloron de siaj vangoj... kaj mi vidis antaŭ mi groteskajn konturojn de abomena monstro, kiu baldaŭ malaperis.

.....  
Oka horo matene. Nova jaro. La unua de Januaro mil naŭcent dek-unu ; komenco de nova jardeko. Tri ciferoj « 1 » estas en ĝi, ĝi estas do la jaro de Triunuo. Miaj infanoj ĉirkaŭas min, ili bondeziras kaj kisas min, — mi ilin.

Oni frapas. La laktovendistino. Maljuna vidvino. Jam de kvar jaroj ŝi alportas ĉiutage la siteleton da lakto al mia hejmo, laŭ mia mendo, — forte miksitajn kun akvo, malgraŭ mia « malmendo ». Mi estus jam de longe ĉesiginta kun ŝi tiun komercan interrilaton, sed ŝi estas tre malriĉa, mi kompatis al ŝi, — kaj ofte ŝi atendis kelkajn semajnojn por la pago, ŝi do ankaŭ kompatis min.

Ŝi eniris en la ĉambron.

— Feliĉan novjaron ! — ŝi murmuretis kun dolĉaĉa rideto.

— Feliĉ... — mi volis respondi, sed mi ne trovis la ĝustan vorton. Kaj mi daŭrigis : « Feliĉe estas por vi, ke mi kuŝas en la lito ankoraŭ ; alie mi vin eljetus, maljuna trompistino !... »

Ŝi forkuris kun kriego, faligante la siteleton sur la plankon. La lakto tie disverŝiĝis, kaj la infanoj kun intereso rigardis, kiel bonhumore la doma hundo ĝin lekkonsumas.

La servistino tuj kuris por aĉeti alian lakton. Dum ŝia foresto venis pala, malgrasa junulo, kun papervindaĵo en la mano. Mi ne konis lin.

— Sinjoro redaktoro, — li komencis balbuti tremvoĉe, — mi havas la grandan honoron prezenti al vi mian novjaran bondeziron kaj tiun ĉi manuskripton de mia ferakonto « La triokula pudelido », originale verkitan en Esperanto.

Unu rigardo sur la manuskripton sufiĉis al mi por rekoni la aŭtoron. Li ĉiumonate sendas al mi tutan paperkorbon da verkaĉoj, tedante min kaj vekante en mi la deziron, koni persone tiun fuŝulon. Jen, mia deziro realiĝis.

Mute mi rigardis la palan junulon.

— Bonvolu akcepti, — petegis la juna palulo, — tiun ĉi artikolon de via humila servopretulo, multestimata redaktora moŝto. Se vi ĝin akceptas, mi jure promesas, ke de nun per duobligita forto mi verkados por « Juna Esperantisto ».

Varmega sango trafuis mian korpon, aŭdinte tiun ĉi sakrilegion. Mi jam ne memoras, kion mi respondis al li ; sed estas fakte, ke li malrapide ekiris returnen al la pordo, ŝirmtenante sian ĉapelon antaŭ sia kapo, kaj, kiam ĝuste en tiu momento la pordo malfermiĝis (la servistino alvenis kun la lakto), li subite eliris el la ĉambro.

Baldaŭ la matenmanĝo estis preta. Lakto kun kafo. La kuiristino metis beletan bukedon sur la manĝotablon.

— Sinjoro mastro, — ŝi ekparolis, — mi deziras al vi longan, feliĉan vivon, kontentecon pri miaj servoj...

— Malspritulino ! — mi interrompis. — Kian sensencaĵon vi babilas ? Ke mi estu feliĉa kun viaj servoj ? Kia absurdajo ! Kĉ mi estu feliĉa pro tio, ĉar vi ĉiutage ĉirkaŭstelas min !

— Sed, sinjoro...

— Kaj ĉar vi ĉiutage faras atencon kontraŭ mia stomako per viaj fuŝkuraĵoj ! Kaj ĉar...

La knabino ekploris.

— Vere, mi esperis ricevi pli belan novjaran donacon.

— Tuj vi ricevos novjaran donacon, — mi respondis kun fulmantaj okuloj, farante signon per mia dekstra mano, el kiu ŝi tre klare povis kompreni, ke ŝi tuj ricevos novjaran donacon, kiu sennecesigos por ŝi la uzon de ruĝiga rizpudro.

Ŝi forkuris el la ĉambro, plorbalbutante, ke ŝi tuj forlasos la domon. Tiu minaca deklaro donis ankaŭ al mi la ideon, forlasi la domon kaj viziti mian onklon loĝantan en la riĉula kvartalo.

Estis malvarme. Kun malfaldita surtutkolomo mi rapidis antaŭen. Ĉe la unua stratangulo mi kunbatiĝis kun longa surtuto, kiu entenis « kōnatan » esperantiston, unu el la speco de la « *inventivozaj* plibonigemuloj ».

— Bonan tagon, bonan jaron! estu sana! — li salutas.

— Malbonan tagon, malbonan jaron! diskreviĝu! — mi respondis forrapidante.

La « eminenta » esperantistaĉo forgesis refermi sian buŝon pro la mirego....

Mi rapidis pluen, por atingi la proksiman stacion de omnibuso, per kiu mi estas veturonta al la onklo. En la omnibuso, por pasigi la tempon, mi komencis legi ĵurnalon, metinte mian ĉapelon apud min, sur la benkon. Enprofundiĝinte en la legadon, apenaŭ mi rimarkis, ke mi jam alvenis al la celejo. Enpoŝiginte la ĵurnalon, mi palpis sur la benkon por repreni mian ĉapelon, sed, ho ve! mia mano enkroĉiĝis en ion molan. Mi rigardas: la molaĵo estas genuo; la genuo apartenas al virino; ŝi estas longa kaj larĝa, — ankaŭ multepeza, kiel mi tuj konstatis el la stato de mia ĉapelo, kiun ŝi ĝentile eltiris el sub si. Ŝi estas mia spicvendistino, la monopola ftizigistino de mia monujo. Nun mi komencas ŝin demandadi, ŝi komencas al mi respondadi, laŭtega interparolado komenciĝas per vortoj ne-troveblaj en la Universala Vortaro, la kunveturantaro ridegas, skandalo fariĝas, la veturil-estro aperas kaj malaperas, policano aperas, li kun ŝi kaj mi malaperas, en la policejo ni reaperas kaj la policestro demandas:

— Kial vi ofendis tiun ĉi sinjorinon?

— Pardonu, sinjoro policestro, mi ne ofendis ŝin, kaj ŝi ne estas sinjorino, sed mia plimalriĉigistino.

— Kio do okazis?

— Tiu ĉi ducentkilogramo « lardamasino » sidiĝis sur mian novan ĉapelon. Vidu, kiel ŝi gladaĉis ĝin.

La policestro, kun la helpo de tri policanoj, metis la « lardamasinon » sur aŭtomatan pesilon, por konstati, ĉu mi estas prava. Sed tiu manovro restis sen rezultato, ĉar la maksimuma pezforto de l'aŭtomata pesilo estis nur 185 kilograma.

La policestro kun afabla mieno gratulis min pro mia preciza taksokapablo, aldonante, ke verŝajne mi estas ekspozicie premiita porkobuĉisto, — kaj kun ne malpli afabla mieno li gratulis ankaŭ la rimarkindan sinjorinon, pro ŝia nesuperebla ampleksa rekordo.

Forlasinte la policejon, baldaŭ mi trovis min antaŭ la Pantheon. Antaŭ mi etendiĝis la strato Soufflot, en kiu loĝas sinjoro Th. Cart. Ĉu vi konas sinjoron Cart? aŭ ne? Nu, mi tuj pre-

zentos lin al vi : li estas la plej fidela, plej laborema, plej sindona, plej energia esperantisto, senĉese batalanta por la unueco de nia lingvo kontraŭ la fuŝagadoj de ŝanĝemuloj, plibonigistoj, vortfabrikistoj, hipokrituloj, ŝtatuloj, glorsoifuloj, famsopiruloj, nigranimuloj, nigramanuloj, monavidaj monopolemuloj kaj aliaj tiaspecaj -uloj. Pro tiu senĉesa honesta batalado lia voĉo fariĝis tondrega, liaj haroj — maldensaj, lia kapreca barbo — griza, lia modesta monujo — malplena (la honestuloj ja ne riĉiĝas!)... Vidu, kiel li aspektas :



Prof. THÉOPHILE CART

Akademiano, Direktoro de la Vortara Fako

Cefredaktoro de « Lingvo Internacia »

Prezidanto de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto.

Mi iris ĉe lin. Post sonorigo ĉe lia pordo, aminda « Cartido » enirigis min. S-ro Cart sidis antaŭ sia skribotablo (li ĉiam laboras).

— Estas vi, Lengyel? Bonan jaron! estu bonveninta.

— Dankon. Feliĉon al vi, plenan, perfektan, konstantan! Sukceson, triumfon al Esperanto per vi!... Mi vin estimas, mi vin amas, mi vin admiras, mi vin adoras....

Tiel mi daŭrigis babili, kvazaŭ ekstaze. Mia konduto estis pli ol deca, ne povante silentigi la voĉojn de miaj korsentoj.

— Ho, amiko, — li tondris kun tre afabla rideto, — ne estu

tiel sentimentala. Vi estas tro entuziasma. Moderu vin. Ni ĉiam laboru diligente, honeste, energie. Jen, prenu cigaredon.

Baldaŭ venis aliaj vizitantoj. Mi konfesis al mi, ke mi fariĝos ridinda — ho, nunepoke la vero, la sincereco, la estimo, la amo estas ja ridindaj! — mi do foriris.

Sur la strato mi renkontis ĉarman fraŭlinon, prave kaj rajte alnomatan « eksbelulino ». Per arĝentsonora voĉo ŝi salutis :

— Ha ! kia feliĉo, sinjoro ! Bonan jaron ! Ĉu vi ricevis mian novjaran poŝtkarton ilustritan ? mi mem desegnis ĝin.

— Jes, fraŭlino, mi konjektis tion ĉi, ĉar komercisto ne kuraĝus vendi tian fuŝaĵon.

Rapide mi forlasis la paliĝantan fraŭlinon, daŭrigante mian vojon. Fine mi alvenis al mia onklo.

La maljuna avarulo sidis meze de sia nehejtita salono, en kaduka apogseĝo, ripozigante sian maldekstran manon sur lambastono. Kiam li min ekvidis, li provis leviĝi de la seĝo, sed ne povis : li estis paralizita.

— Mia onklo, — mi komencis paroli, — hodiaŭ estas la unua tago de la nova jaro. Jen mi venis ĉe vin, por esprimi al vi miajn dezirojn. Mi tre ĝojas... ĝojas... vidante, ke vi... ke vi estas... en malbona fartostato... ĉar ĝi esperigas... vian... vian baldaŭan morton... kaj tiam mi heredos... vian riĉaĵon... pri kio mi... tiel vane sopiris... ĝis nun...

Frapkrako per lambastono sur mian kapon min rekonsciigis. Blekante mi forkuris, kuris tra la stratoj, ĝis mia hejmo, kun nigra makulo en la koro, kun ruĝa sur la kapo.

Adiaŭ, onklo ! adiaŭ, testamento ! adiaŭ, heredo !

\*  
\* \*

Kaj nun mi sidas sola en mia ĉambro, senpove, kiel apopleksiulo ; kondamnita, hipnotigita al ver-diro. Hodiaŭ, pro tiu ĉi sugesto, mi ne povas mensogi, nek flati, nek hipokriti. Por kio mi profitu la tempon ? Mi volas skribi leteron al konatulo : la plumo rompiĝas ; mi ekverkas artikolon : la inkujo renversigas.

Ha, tiu kruela diino de Mensogo !...

Kion fari ? Denove mi reprenas la plumon, por ion skribi. Kaj jen, la plumo bonege funkcias, fidele al mia verkondamno, vigle kraketas sur la papero, elverŝante el si belajn kursivajn literojn :

*Vivu Esperanto ! Vivu nia glora Majstro ! Vivu la fidelaj samideanoj ! Feliĉan, bonan novjaron al la lĝantoj de « Juna Esperantisto » !*

PAUL DE LENGYEL.





## DEĴETU ŜIMON ...

« Ho, vane, vane serĉus la homo  
La paradizon sur mizervalo ...  
Ĝi ne ekzistas, kaj nur fantomo  
Restis por nia viva batalo. »  
Ĉiuj ripetas tion sen fino,  
« Homo al homo estas Kaino. »  
Ho, vi trompigas, gento mizera,  
Ne tia estas la sorto la tera ...  
Vi ĝis nun estas sub la influo  
De la satana forta potenco ...

Deĵetu brave ŝimon per skuo  
Kaj marŝu kune en bonintenco.  
Ho, revekiĝu tuta homaro,  
Kaj per cedemo kaj bona faro  
Pruvu ekziston de la animo,  
Deĵetu vian tegon de V ŝimo.  
Nur reciproka, frateca amo  
Estu por ĉiam via ornamo.  
Kaj per konsento, paco, amemo,  
Revenos nia ĉarma Edeno.

D-ro Antono Vjeĉorkjeviĉ.



## FATO

Araba parabolo.

Bagdado lumbrilis. La tre maljuna kalifo Harun-Al-Raŝid invitis al si siajn amikojn kaj subulojn. La grandveziro dum kelkaj noktoj nek manĝis, nek dormis, preparante la palacon por la festeno.

La festeno komenciĝis. Sed jen la veziro alproksimiĝis al sia severa Sinjoro; lia vizaĝo estis rigida, kovrita per terkolora paleco kaj li tuta estis tremanta pro teruro.

— Ho, granda Sinjoro, — ekmurmuretis la veziro, — mi vin petegas, forpermesu min. Mi devas senprokraste forrajdi. . . . Mi volas seli miajn kamelojn kaj tuj forvojaĝi malproksimen de tie ĉi, en Sirion.

La maljuna kalifo mirigite levis sian rigardon sur la veziron kaj demandis lin :

— Kial vi tiel rapidas, ho filo mia? Ne decas al vi forlasi miajn gastojn; la festeno ja ĵus komenciĝis. Kio tiel konsternis vin? kio tiel ĉagrenas vin?

Kaj la veziro tremvoĉe respondis :

— Mi ĵus renkontis la Anĝelon de l' Morto; li fikse rigardis min, kaj per tio mi komprenis, ke mi estas tuj mortonta, se mi ne tre rapidos min savi.

— Se estas tiel, — diris la kalifo, — mi forpermesas vin kun paco. Alah estu kun vi!

La veziro forrajdis.

... Samvespere la kalifo mem renkontis la Anĝelon de l' Morto kaj demandis lin, kial li direktis sur la veziron tiel exploreman rigardon?

La Anĝelo respondis :

— Mi estis miregigita, ekvidinte lin ĉeestantan tie ĉi, ĉe la festeno; ĉar mi ricevis ordonon, ke mi mortigu lin morgaŭ sur la vojo al Sirio.

*El rusa lingvo tradukis N. ŜVECOV.*

---

## FELIETONO

---

### Protokto.

Vi min kredos, nur tial, ke mi ne kuraĝas nomi la simpatiindan deputaton, ĉe kiu okazis la jena sceneto.

Li estas kuracisto, kaj havas, ekster la horoj devigataj al sia deputatofico, konsulton, kien venas multaj, eĉ malsanuloj.

Ĉar la nombro da klientoj estas ega, kaj la doktoro disponas por ĉiuj malmultan tempon, li devas rapidi.

— Senvestigu vin!... Bone!... Kio doloras al vi?

Kaj rapidskribe lia plumo knaras recepton.

— Nun, alia sekvu!

Kaj alia sekvas, kaj tiel plu.

Iafoje, inter la senfina aro da malsanuloj, li ekvidas junan, fortan viron, malbele vestitan, sed kleran, tiel ke, antaŭaŭdinte la ordonon, kiun la medicinisto faras al ĉiu pri senvestiĝo, li ĝin ne atendas, kaj demetas la tutan vestaĉaron.

Tio ĉi favore impresigas la doktoron :

— Bonege!... Kio estas al vi?

— Nenio, sinjoro kuracisto, nenio plu estas al mi, de kiam mi demetis ĉiujn vestaĵojn.

— Ni rapidu!... Kie vi suferas?

— Mi nenie suferas.

— Kial do vi senvestiĝis?

— Mi faris same, kiel la ceteraj.

— Sed kion vi serĉas ĉi tie?

— Vian helpon. Mi alportas al vi peton, por ricevi oficon en la poŝto.

La mizerulo opiniis, ke li devas senvestigi sin por tio. Aliaj kontraŭe sin maskus antaŭ la protektonto.

La viro ricevis la petitan oficon.

## Eltiraĵo el « Fatala Ŝuldo ». (1)

..... La animo, laŭ signorina Fiammetta, la animo estas el dia esenco; pro tio, ĝi estas senmorta, ĉar diaĵo ne povas pereii. Sed, tiu diĉo estas latentata en ĝi, kvazaŭ dormanta. Ĝi estas kvazaŭ la princino en la « Bois Dormant »! Necesas, ke ĝi vekigu iam, ke ĝi eliru el sia longa dormado. Kiu elirigos ĝin? Estas la evolucio; estas la eksperimentoj, senĉese ripetitaj. La evolucio kondukas tiun infanan animon tra la regnoj minerala, vegetala kaj animala, ĝis la homa regno, en kiu ĝi lernas la plej malfacilajn lecionojn, sed ankaŭ la plej altvalorajn. Dank' al longa serio da ekzistadoj, en kiuj ĝi prenas diversajn formojn... ian tagon montriĝante sub virina korpo, alian sub vira korpo, ian tagon en mezo malriĉa aŭ modesta, alian en luksa ĉirkaŭaĵo (per tago, mi volas diri: vivo)... dank' al tiu longa serio da ekzistadoj, mi diras, ĝi pasas tra ĉiuj eksperimentoj de l'homa gento, kaj tion farante, ĝi progresas. Estas kvazaŭ la lernanto, kiu iras el la sepa en la sesan klason, k. t. p., k. t. p.

La eksperimentoj amasigitaj en la sennombraj vivoj alkondukas al saĝeco; la konscienco perfektigas kaj plinobiĝas. La sufero estas granda instruanto por la animo; ĝi ebligas, ke ni komprenu la aliajn animojn, la simpatiojn, la kompaton. Kaj la sufero estas neevitebla, ĉar nescianta animo pekas laŭ ĉia ajn maniero. Dum sia voĵiro, ĝi ofte falas. Nu, ĉio devas esti pagita; la malbono pagigas per la sufero, la bono farita, per la feliĉo. Ĉion, kion ia animo suferigis al aliaj dum antaŭa vivo, ĝi suferos mem de la aliaj animoj, dum estonta vivo. Ĝi estos devigita elpigi sufiĉege ĉiujn faritajn ŝuldojn. La destino nenion forgesas kaj metos ĝin sen pero inter vizaĝoj, kun ĝiaj viktimoj, ankaŭ kun ĝiaj suldantoj. Laŭjuste ĝi ricevos, se ĝi estis justa. Se ĝi estis bona kaj helpema al ĉiuj, ĝia estonta vivo estos radia, beligita de la amoj kaj sindonoj, kiuj prezentigos por ĝi. La egoisto rikoltos solecan vivon.....

---

## Enigmo.

En malproksimaj de ni tempoj vivis tri bravaj princoj belaj; ĉiuj ili estis enamiĝintaj en la belan princinon, kiu simpatiis al ĉiuj tri egale.

La princoj petis la manon de la princino, sed ĉar al ŝi ĉiuj estis egale ĉarmaj, ŝi diris al la princoj:

« Ĉiuj vi estas al mi ĉarmaj, ĉiujn vin mi amas kaj pro tio rifuzi iun ajn el vi mi ne povas; do veturu iun ajn regnon, aĉetu kaj donacu al mi ĉiu ion; kies donaco estos la plej bona, je tiu mi edziniĝos. »

La princoj forveturis, kaj, post longa serĉado, aĉetis: unu la spegulon, kiu posedis mirindan econ, nome, se oni en ĝin rigardas, oni vidas ĉion, kio fariĝas en la mondo; alia — tapiŝon mem-

---

(1) Vidu nian Bibliografian rubrikon, p. 12.

flugantan; la tria — pomon, ankaŭ kun bonega eco: se oni donas ĝin al mortanto, tiu ĉi tuj reviviĝos.

Aĉetinte la donacojn por la princino, la princoj sidis en unu hotelo, kaj ripozante, post longa vagado, ĉe pokaloj da ĉampano, tre gaje babilis...

Subite, la posedanto de la spegulo ekkriis:

« Amikoj; sciuj, ke nia princino estas mortanta! »

« Ni do sidigu sur la tapiŝon memflugantan kaj ni rapidu », diris la dua...

Post unu momento ili estis alveturintaj al la mortanta princino. Tuj la princo posedanta la miraklan pomon donis ĝin al la princino, por ke ŝi ekmanĝu ĝin. Ŝi tion farinte levigis de la lito tute sana. Tiamaniere ĉiuj donacoj estis ricevitaj de la princino... Do, je kiu ŝi edzinigis, kaj kial?

*Esperantigis ANATOL KOH.*

## BIBLIOGRAFIO

*La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.*

**Fatala Ŝuldo**, de LIONEL DALSACE, kun la permeso de la aŭtoro tradukis el franca lingvo EUGÉNIE FERTER-CENSE. 318 paĝoj, 11×17 1/2 cm. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo 3,50 fr. (1,40 S).

Ĉu oni akceptos aŭ ne allasos la ideon pri la reenkorpiĝo de la animoj post la morto, oni tre plezure tralegos tiun tre interesan historion, kiu estas verkita pri la ĵus dirita teorio.

En sia nuntempa vivo, la personoj, kiuj agas en tiu ĉi romano, estas la samaj, kiuj jam kunvivis ne sole en ia praepoko, sed ankaŭ dum du aŭ tri periodoj malpli malnovaj. La verko celas elmontri tiun filozofian ideon, ke ĉiu bona ago estas paŝo al la morala perfektigo, kaj ke ĉiu malbona ago devas esti elpagita dum la sinsekvaj vivoj de la kulpulo, ĝis kiam tiu ĉi atingos la plenan perfektecon. Per tiu ĉi temo la aŭtoro sukcesis aranĝi verkon tute rimarkindan pro ĝia bel-eco kaj allogeco.

La traduko estas tre bone farita, en stilo simpla, klara, plaĉa, kaj ni tute povus rekomendi ĝin kiel ekzemplon de la vere Zamenhofa lingvo, se ne estus kelkaj maloftaj provoj de novaj, senutile enkondukitaj radikoj, kaj, tri aŭ kvar fojojn, la uzo de l'sufikso *oz*, kiuj faras verajn makulojn en tiu bela traduko, cetere tute aprobinda kaj laŭdinda.

**Annuaire** de la *Société Française pour la propagation de l'Espéranto*, 1910. — 88 p. 11×17. — Paris, 33, rue Lacépède.

La enhavo de tiu ĉi Jarlibro de la S. f. p. E. estas: mallonga raporteto pri la Societo, Komitato, Federacioj, Grupoj, Izolitaj membroj. Alfabeto repertuaro plifaciligas ĝian uzadon.

**Portreto de D-ro Zamenhof**, formato 48×64 centimetra, eldonita de la Centra Komercujo por Esperantujo, Johannès Heyn, Leipzig, Thomasring 6 (Germanujo).

Kolorpresita, enkadriginda, granda portreto de nia kara Majstro, kiu estos vera ornamo de la ĉambro de ĉiu esperantisto.

**Dictionnaire complet Esperanto-Français** par E. GROSJEAN-MAUPIN. 255 p. 10 × 15. — Librairie Hachette et C<sup>ie</sup>, 79, Boulevard Saint-Germain, Paris. Prezo 2 fr. (0,80 S).

“Tiu ĉi duon-Ida vortlibro, — diras «Lingvo Internacia», — enhavas amasegon da pli malpli senutilaj vortoj, elpensitaj de la aŭtoro mem aŭ ĝis nun renkontitaj nur en Idaj aŭ «Idatraj» tekstoj, kiel ekzemple: *apropose* (pri tio), *cis* (tiuĉiflanke), *forse* (eble), *iŝi* (ili, pri virinoj), *nam* (ĉar), *no* (ne), *olim* (iam, kun verbo en pasinta tempo: mi iam legis), *retro* (returne), *so* («aserta vorto respondanta nean demandon»), — *aspra* (malglata), *dura* (malmola), *sinistra* (maldekstra), — Idaj afiksoj: *mis*, *iv*, *iĝ*, *oĝ*, ... — Vortoj de la *Universala Vortaro* estas forigitaj en «aldonon» kiel malkonsilindaj: *frugilego*, *oksi-koko*, .... Aliaj vortoj ankaŭ de la U. V. estas diverse kripligitaj por «plibonigo»: *alumedo* (alumeto), *akridio* (akrido), *espoĉicio* (ekspoĉicio), *fenklo* (fenkolo), *harengo* (haringo), *legendo* (legendo), *lekando* (lekanto), *leksiko* (leksikono), *lolio* (lolo), *mortelo* (mortero), *roado* (rodo), *situo* (situacio), k. t. p.... Efektive verko tre rekomendinda al ĉiaspecaj plibonigistoj, reformistoj, Idistoj, Adjuvilistoj kaj aliaj -istoj, sed vera «sabotado» de Esperanto! D-ro P. CORRET.

Erarojn tre certe enhavas bedaŭrinde ĉiuj niaj vortaroj, sed tie ĉi la eraroj estas volaj, intencaj, *sistemaj*: ili ne plu estas eraroj, sed *kulpoj* kontraŭ la lingvo. Tia vortaro estas ne nur malbona vortaro, sed ankaŭ *malbona ago*. TH. CART.

Niaflanke, ni povus multon skribi pri tiu verko, kiu estas vera atenco — kaŝita per allogtona Antaŭparolo — kontraŭ la unueco de la Fundamenta Esperanto; sed ni ne faras tion, ĉar ni ne volas plenigi la paĝojn de «Juna Esperantisto» per la priskribado de tiu libro. Ni do petas tiujn, kiuj deziras havi detalan informon pri tiu ĉi malrekomendinda vortlibro, bonvolu legi la paĝojn 556—563 de «Lingvo Internacia», decembro 1910; la tie legebla recenzo aperis ankaŭ en aparta broŝureto, kaj *ni volonte sendos ĝin senpage al niaj legantoj*, kiuj tion deziras. El ĝi ni represas tie ĉi nur tekston redaktitan en Grosjean-Maupina lingvo:

— *Pa! Kia misevento!! Mi apropose povas diri, ke oni averiis ĉiujn fitojn per duraj fusiltuboj, rompante la ultimajn, asprajn, tamen kreskivajn rufajn botonojn. Oni asaltis min mem, sed mi fugis sinistren, nam flanante cis vitriĝita bariero, mi aŭdis, ke iu fitartiklistino per akumultitaj voĉfortoj diskursas, en la norda parto de sudejo de olim staniĝitaj kuiriloj, al la tieaj frekventantinoj, pri grosa kaj malgrosa misvendado de grosoj kaj aliaj sukoĝaj truktoj. Kun horora bakrio mi retrofugis kun iŝi sur la malfitoĝan kampon, kie mi nun reflanas, mangante flanon kaj omagiante al mortiva kaj forse misvoliva konkvestisto konk-vestisto.... No?... So, sinjoro!*

Jen, kara leganto, tiu ĉi teksto estas skribita en Esperanto — laŭ S-ro Grosjean-Maupin!... Se ni ne timus trostreĉi la paciencon de niaj legantoj, se ni ne timus ilin naŭzigi: ni metus tiun ĉi tekston kiel tradukotan problemon en la rubrikon *Niaj Konkursoj*; sed ni ne faras ĝin, ĉar ni respektas la legantaron de «Juna Esperantisto». Aliparte, ni kuraĝus veti, ke tiun «Esperantan» (?) tekston neniu komprenas, — krom S-ro Grosjean-Maupin mem.

Esperantistoj! Ni restu fidelaj, ni ne ŝanceliĝu! ni sekvu, ni propagandu *nian* lingvon internacian: la *Zamenhofan* Esperanton, — kaj ne la *Grosjean-Maupinan!* P. DE LENGYEL.



## PEDAGOGIA FAKO

(Volonte ni respondas al niaj abonantoj en tiu ĉi rubriko iliajn lingvajn demandojn komune interesajn.)

**La akuzativo de direkto.** (Responde al S-ro G. B.) — La akuzativon de direkto oni uzas ĉe lokŝanĝa ago, kiu komenciĝas ekster la difinita loko. Ekz. : « mi iras en la *ĉambro* » signifas, ke mi ne estas en la ĉambro, kaj mi iras por esti en ĝi; dum « mi iras en la ĉambro » signifas, ke mi estas interne de la ĉambro kaj tie mi iras. (Vidu : *Ekzerco*, § 26.) — Oni ofte ripetas la prepozicion de direkto, kunmetante ĝin kun la verbo : mi *eniras en* la ĉambro; li *surmetis sian ĉapelon sur* sian kapon. Ĉe prepozicio esprimanta direkton per si mem, oni ne uzas akuzativon; ekz. : mi iris *el* la ĉambro, aŭ : mi *eliris el* la ĉambro (ne : *ĉambro*); li ŝin premis (aŭ : *alpremis al* sia brusto (ne : *bruston*).

*Pri aliaj lingvaj demandoj ni parolos en la venonta numero.*

## HUMORAĴOJ

**Ĉu kredinda?** — Instruisto, en sia ĝardeno, rimarkas, ke unu el la lernantoj rampas sur pomarbon.

— He, ci, bubo! kion ci volas fari sur la arbo?

La bubo, surprizita, montras sur la supron de l' arbo, inter kies folioj sin kaŝas alia bubo.

— Fritz volas ŝtelkolekti pomojn, — li respondas balbute.

— Kaj ci? kial ci surrampas?

— Mi... mi intencas lin malinstigi je tiu peka ago.

**Ho, sankta simpleco!** — Sinjoro Skrupuliĉ, profesoro de Esperanto, vojaĝanta sur la kamparo, eniras vilaĝan restoracieton por tie tagmanĝi. La gastejestro, honesta, sed neinteligenta vilagano, lin servoprete demandas :

— Ĉu via moŝto deziras tagmanĝi?

*La profesoro* : Jes, se vi povas al mi tuj servi.

*La gastejestro* : Bovida' rostaĵo kun kukuma salato estos *prete* dum kvin minutoj.

*La profesoro* : Bone, faru do ĝin; sed ne uzu adverbajn atributon post substantiva subjekto.

*La gastejestro* (konfuzite) : Estu trankvila, via moŝto; ni uzas nur freŝan viandon kaj unuakvalitajn legomojn.

**Rimedo.** — *Sinjinoro* : Volonte mi donacus al vi unu malnovetan surtuton el la vestoj de mia edzo : sed mi ne kredas, ke ĝi taŭgus al vi, ĉar vi estas maldikulo, kaj mia edzo estas grasa viro. — *Almoŝulo* : Ho, sinjinoro, tiu cirkonstanco neniel ĝenu vin en via bonfaro, kaj mi proponas al vi la jenon : mi venos ĉiutage tag- kaj vespermanĝi ĉe vin, vi regalos min bonege, kaj tiamaniere mi konvengrasigos por la surtuto.

## NIAJ KONKURSOJ

*Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 S.* — 2) samon en valoro de 1 S. — laŭ elekto de la premiotoj.

Pri nia septembra konkurso, — kiu estis : verku frazon, kies vortoj laŭvice komenciĝas per la literoj de la vorto « Esperanto », — ni ricevis la sekvantajn 39 respondojn :

1. Edukita sincerulo pro energiaj riproĉoj ankoraŭ neniam tro ofendiĝis.
2. « En sonĝo principon . . . » Estas ruzaĵo aludi nepripense tiun odon.
3. Ekstre scienca profesoro, en ripetlernejo, al neatentulo, tiris oreleon.
4. Esperanto sola povas efektiviĝi reciproke amon, neniam trudaĵojn okazigante.
5. Estu saĝa, prudenta, energia, religia, afabla, nevengema, trankvila, obeama.
6. Edmondo, Simono, Petro estas redaktoroj; Andreo, Nikolao, Teodoro oficistoj.
7. Estimata Sinjoro Paŭlo, elektu respondon asekurontan nian triumfon. Odette.
8. Esperanta stilo povas esti regula, akceptante nenian tiranecan ordonon.
9. Esperantistoj! silentigu polemikulojn, evitu regulojn akademian, ne trograndigu obeemon.
10. Esperantistoj! simple propagandu Esperanton, rifuzu argumentadon, neniam trograndigu organizemon.
11. Ekster sia patrujo Esperantiano renkontas ankoraŭ novan tutmondan organizaĵon.
12. Esperantisma sistemo preskaŭ egalas religion afablan, neniel trudantan okultaĵojn.
13. Esperanto solvas problemon elimini rasan antagonismon, naskante tolerecon ofereman.
14. Esperanto serĉas proksimigi ekfremditajn rasojn al nova tutmonda oferemo.
15. Estu senĉese prospera, en rilato amika, nia tutmonda organizado!
16. Estu sendube peko Esperanton reformi arogante, neante tutmondan oferon.
17. Egale samidealano povas esti riĉa aŭ ne, tamen ovaciĝas.
18. Efektiviĝos solvo popola en regulo, amo, nia tera ornamo.
19. « Eduko saĝa prezentis embarasojn », rimarkis amiko najbaro, trankvile oscedante.
20. Esperu, sanktuloj! Paradizo estos rekompenco al novaj turmentitoj.
21. Ebene, sincere parolas elokventa revulo, anoncanta: « neni tiam ordonados ».
22. Elokventa, saĝa prezidanto efektive raportis arte, neniigante tamen ordonon.
23. Estimata Sinjoro, per Esperanto respondu al ni tre ofte.
24. Esperanton scii povas esti rekomendote al niaj tramvoĵaj oficistoj.
25. Edzinetu sen prokrasto eliris rapide aĉeti nukson, tomaton, okzalon.
26. En stato precipe ebria, Romano, anstataŭ nektaro, trinkis oleon.
27. Esperanto sendube prosperos en Rumanujo, Anglujo, Norvegujo, tute okulvideble.
28. Esperu! Scienca Polo el Ruslando alportis novan trezoron oficialigotan.
29. Estimataj samidealanoj, partoprenu en rondo amika nian taŝgan organizaĵon.
30. En « Sesa » pacemaj esperantianoj revadis al « Naŭa » triumfo okazonta.
31. Esperantistinoj, silentu! pace esperu! rendezuojn antaŭviditajn naskos tuta orkestro.
32. Entuziasmigataj samideanoj persisteme enradiku regulojn absolutajn ne tuĵ observitajn.
33. En Svislando por Esperanto rapidu agemaj nacioj! Trafu obstino!
34. Emajlita steleto pri Esperanto rememorigu al ni tian ovacion.
35. Esperantistaj samlandanoj per Esperanto revivigu ankaŭ niajn tragediojn originalajn.
36. Eminentaj scienculoj pro Esperanto ree alveturu norden, tropiken, orienten.
37. Esperu sen ploro. Esperanto renkontos amikojn novajn tre ofte.
38. En Sankt-Peterburgo Esperanto rekomencas al nova triumfo organiziĝi.
39. Etendante sin per Esperanto, religio al ni trovigas oportunecon.

\*

\* \*

Krom la kutimaj du premioj, ni donos ankaŭ kvin honorajn premiojn, po 0,50 Sm. en libroj elektotaj de la premioj. — La pre-

miojn ni donos al la aŭtoroj de tiuj frazoj, al kiuj *nia legantaro* ilin aljuĝos.

Ni do petas niajn legantojn, ke ili bonvolu vicaranĝi laŭmerite la supre presitajn 39 frazojn, citante ilin nur per ilia kuranta numero, kaj sendi tiun respondon *al la Redakcio* antaŭ la fino de Marto 1911. Tiujn voĉdonojn ni mem aranĝos laŭvalore kaj donos la premiojn al la personoj ricevitaj plej multe da voĉoj.

Aŭtoroj de la konkursaj frazoj ankaŭ povas partopreni al la juĝo, sed ili ne rajtas voĉdoni por siaj propraj frazoj.

Ĉiu premio povas ricevi nur po unu premio. Se do, per la voĉdonoj, al iu persono (aŭtoro de du aŭ pli da frazoj) estus aljuĝata du aŭ pli da premioj, el tiuj li (ŝi) ricevos nur unu, la plej altvaloran, — kaj la sekvanta(j)n ricevos la vicesekvanta premio.

La rezultaton de la voĉdonoj, kune kun la nomaro de la gajnintoj kaj de la aliaj konkursintoj, ni publikigos en nia aprila numero. Ni intence prokrastas ĝis tiam la publikigon, por konservi la sekretecon kaj nebligigi eĉ la plej malgrandan partiecon de la juĝado. En la maja numero ni publikigos la nomojn de la juĝintoj.

Ni esperas, ke multaj el niaj legantoj partoprenos al tiu interesa konkursa juĝado.

Novan konkurson ni malfermos en nia venonta numero.

---

### Korespondado de la Redakcio.

Ni petas tiujn personojn, kiuj deziras ricevi de ni leteran respondon, ke ili bonvolu sendi al ni internacian respondan poŝtkarton aŭ internacian poŝtan respondkuponon.

*X-Y-Z.* — Ne estas eble, ke inter la priskribitaj de vi cirkonstancoj, iu ajn komercisto konsentu pri ĝi.

*Pilgrima kanto.* — Ni amase ricevas poeziojn, ni do havas la eblecon elekti el ili bonajn. Via poezio ne estas presebla, ĉar ĝi ne obeas la regulojn de la versfarado: aliparte ĝia temo estas jam tro eluzita. Cetere multaj gramatikaj eraroj estas en ĝi. Tiu cirkonstanco, ke vi estas nur duonjara esperantisto, ne estas motivo por presebligigi vian verkon. Ni esperu, ke post nova duonjaro vi mem konfesos tion ĉi kaj produktos pli bonan *prozaĵon*.

*Al S-ro Th. E. Pl.* — Ricevita, aranĝita. Dankon!

*Al S-ro S. M. (B—m).* — Ĉar la abonprezo de « Juna Esperantisto » estas tre malalta, ni estas devigataj kiel eble pleje moderigi la nombron de la senpagaj ekzempleroj. Tial, je nia bedaŭro, la Administracio ne povas plenumi vian deziron.

*Pipro.* — Unu problemon ni presos en « Lingvo Internacia », la alia ne taŭgas.

*La ruĝaj knabinoj.* — Ne estas tre interesa; cetere, kelkaj eraroj estas en ĝi, kiujn oni ne povas korekti kun la konservo de la versformo.

*Al S-ro M. Br.* — Li ne sendis al ni sciigon.